

Numero: 289.
Junio: 2016.

24-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Iam estis Esperanto klubo "JUNA KORO"

Mi sidas antaŭ la monitoro kaj mi retumas. Mi legas diversajn artikolojn pri Esperanto-kluboj kaj grupoj.

Neatendite mi ekvidas malnovan foton pri Esperanto - klubo JUNA KORO.

Kvazaŭ kurento trakurus mian korpon. Mi skuiĝas. En mia cerbo iamaj travivaĵoj dancas. Mi fermas miajn okulojn. Mi memoras.

Ankaŭ mi estis la membro de ĉi tiu klubo. Kiel belgaj jaroj estis, kiam mi estis junakorano.

Jes mi estis junulo. Tre juna. Apenaŭ mi ekkonis la zamenhofan lingvon.

Ĉi tiu klubo funkciis en admirinda hungara urbo Zalaegerszeg.

Estis skribita jaro 1972, kiam mi paŝis tra la sojlo de Esperanto klubo.

Tie mi infektiĝis kaj ekde tiu unua vespero mi fariĝis entuziasma membro de la klubo.

Dum la jaroj, eĉ jardekoj mi travivis multegajn neforgeseblajn horojn kun la klubanoj. Ili ĉiuj iĝis miaj sinceraj geamikoj.

Estis multaj komunaj programoj. Por mi ĉi tiuj klubvesperoj ĉiam estis festoj. Mi estas konvinkiĝinta, ke ankaŭ aliaj klubanoj same opinias. Ili dolĉiĝis mian vivon. Mi ricevis belegajn travivaĵojn de la vivo.

Esperanto - klubo JUNA KORO ekzistis dum pluraj jardekoj. Mi certe scias en nia koro, kiuj vizitis ĝin semajne en ĉiu vendredo, la klubo ĉiam ekzistos. Nin kunligas nevidebla fadeno, kiu neniam ŝiriĝas.

Mi sidas antaŭ la monitoro kaj nombras la forkurintajn jarojn.

Mi ne scias, kiom da jaroj ankoraŭ restis por ni kaj mi ne scias, ĉu venos generacio, kiu sekvos nin? Estus bone, se ankoraŭfoje Esperanto - klubo JUNA KORO reviviĝus kaj ni denove povus viziti ĝin, kiel en tiuj belegaj jaroj.

En nia brusto pulsas JUNA KORO.

-Redaktanto-



Lingvo estas fortikaĵo

-Se vi deziras lerni iun fremdanlingvon, bone se vi scias, ĉiulingvo estas fortikaĵo, kiun vi volas okupi.

Vi devas ataki, sieĝi la dikajn murojn de la fortikaĵo.

Ne forgesu, via milito ne estos facila. La lingvolernado bezonas multe da viktimoj. Vi devos oferi multe da horoj el via libertempo.

Komence ĉio ŝajnas facila. Vi pensas dum kelkaj monatoj vi proprigos la lernatan lingvon, kaj baldaŭe vi povos uzi ĝin.

Mi jam nun avertas vin, kara lingvolernanto, alvenos tago, eble nur post monatoj, kiam vi malesperiĝos kaj decidus ĉesi lalingvolernadon.

La fortikaĵo montriĝos tro malfacila por ke okupi la murojn. Se vi rezignos ĉi fortikaĵo ne kapitulacas.

Neniam malgajiĝu kaj ĉesu la atakon! Ĉiutage en ĉiu horo luktu por ke ĉi tiu fortikaĵo estu okupita.

Ne bedaŭru la ofertojn! Se vi eltenas, en iu tago ekbrilos la sukceso kaj la atako de la fortikaĵo estos rezulta.

Ĝis la lasta venko vi devos ekzerci la lingvon ĉiutage. Ne gravas kiel. Legu, skribu, parolu, konversaciu aŭ aŭskultu parolojn helpe de iu komunikilo!

Nuntempe tiom multe da komunikilo ekzistas, ke vi povas elekti el ili. La lingvolernadon tre plifaciligas la komputilo kaj interreto. Rete vi povas trovi ĉion necesan, kio estas bezonata por lerni fremdajn lingvojn.

Komprenoble gravas ankaŭ bonega lingvoinstruisto, kiu helpas al vi. Lia aŭ ŝi klarigas perfekte al vi la gramatikon kaj li ekzercigas la lingvon.

Ne pasu tago sen ekzerco de la lernata lingvo. Se vi havas liberan duonhoron, kaptu la okazon por ateki la fortikaĵon.

Ne aŭskultu la diableton en via cerbo, kiu provas konvinki vin, ke morgaŭ vi ne estos laca kaj tiam vi povos lerni pli bone kaj intense.

Se vi forĵetos la eblecon kaj vi aŭskultos je la diableto, morgaŭ duobliĝos la lernenda leciono. Krome ankaŭ morgaŭ la diableto diros al vi: „morgaŭ”.

Multaj homoj tial ne povas ellerni iun fremdan lingvon, ĉar li/ŝi akceptas la proponon de la diableto. Vi ne estu tia homo. Ĉiutage lernu kaj ekzerco la lingvon.

Se vi akceptas mian proponon, mi garantias, fine vi okupos la fortikaĵon.

-Ŝaŝa-



POEZIO

Mi legas ĉiutage verson. Ĝi estas ĉiela muziko por mia animo kaj koro. La verso trankviligas kaj instigas min pensi pri la mondo.

Ofte krutaj poemoj enhavas tutan universon. Ĝi montras al mi la ĝustan vojon.

Amiko, ĉu ankaŭ vi sentas ĉi tion legante poemon?

Mi aŭdis legi poemon jam ne laŭmode. Nur kelkaj fanatikuloj prenas en siajn manojn poemplibron.

Kial estas tio?

Mi ne kredas, ĝin kaŭzas la kureganta vivo. Ni fariĝis indiferentaj pri la beleco de la mondo.

Nikolao Hohlov La luna ebrio

Jen – ĝi brilas, mia luno,
Virgomaska amlucerno,
Nuda mammo el latuno,
Iritilo de l' eterno...

Jen – ĝi trenas, pala torĉo,
Tra l' cipresoj ombran langon –
Kaj la tero sub la sorĉo
Paroksisme verŝas sangon.

Jen – ĝi paŝas, noktulino
Plej alloga, rafinita –
La komenco kaj kulmino
De l' pasio senevita.

Jen – ĝi tiklas kaj sufokas,
Estingante ĉiun honton,
Jen – ĝi vokas, laŭte vokas:
Serĉu, kaptu kunĝuonton!

Kaj subiĝas la animoj,
Kaj triumfe batas koroj,
Estas for la tagaj limoj,
Kaj ne gardas la honoroj...

Vivajn korojn ligas pare
La magia lumsonato
Por oferi suraltare
Al Eroso kaj Hekato.

Per la flamaj rozkoloroj
Juna virgo amburĝonas.
Kaj anstataŭ la paroloj
Longaj, longaj kisoj sonas...

Ah, – dronante en inspiro
De la tenta nokta disko,
Estas ĝoje – esti viro
Kaj facile – odalisko...

Petőfi Sándor La poetoj de la XIX. centjaro (Esperanto)

Facilanime sin neniu
dediĉu al surkorda lud':
tre gravan taskon entreprenas,
kiu nun tuŝas al liut'.

Se vi kapablas sole kanti
pri l' propraj ĝojo kaj dolor',
ja vin la mondo ne bezonas,
la sanktan lignon metu for!

Ni migras en dezerto, kiel
la judoj laŭ la voj-preskrib'
de l' flamkolono, kiun Dio
alsendis por la migra trib'.
Nuntempe, kiel flam-kolonojn,
poetojn donis Dia man',
ke ili gvidu la popolon
el la dezert' al Kanaan'.

Poetoj, do tra fajro-akvo
ek por popol', ek por la ver'!
Malben' al ĉiu forĵetinta
standardon de l' popol-liber'!
Malben' al ĉiu postrestanta
pro pigro aŭ pro malkuraĝ',
ke, dum aliaj luktas, ŝvitas,
li mem ripozu en ombraj'!

Estas profetoj falsaj, kiuj
malice trompas per malver',
dirante: Haltu, ĉar ni staras
jam sur la promesita ter'.
Mensog', mensog' impertinenta!
Jen milionoj por refut',
kiuj malsate, malespere
sin trenas sub la ŝarĝ' de brut'.

Se preni el abundo-korbo
egale ĉiu povos jam,
se lokon ĉe la rajto-tablo
egale ĉiu trovos jam,
se lumo de spirit' lumigos
Ĉiun fenestron de kaban',
tiam ni povos diri: Haltu,
jen estas jam la Kanaan'.

Sed plu ĝis tiam, plu senhalte,
ni penu, luktu plu sen ĉes'!
Se l' vivo eble la klopodojn
pripagos per nenja prez',
ja l' mort' okulojn niajn fermos
per milda kiso, dolĉa rav',
kaj silk-kusene per florĉeno
subblasos nin al tomba kav'.

Tradukis: Kalocsay, Kálmán

Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XXIV-a

Johano eksaltis je la nomo Elizabeta. Kvazaŭ li estus perdinta la sobran menson je la aŭdo de la nomo Elinjo.

Kiel ĝi povas okazi. Ĉu ankaŭ ŝi estas ĉi tie. Li sentis, ke frenezigos baldaŭe, se li ne scios, kio estas ĉirkaŭ li.

Neatendite la onklino malaperis. Nenie li vidis ŝin. Kvazaŭ la maljunulino estus forvaporiganta.

Kion fari nun?

Li deziris kuregi al Elizabeta kies konturoj ekaperis en la malproksimo. Malgraŭ tio Johano timis forlasi la lokon, kie li estis kun sia onklino.

Ĉi tio estis ĝena situacio. Estus bone scii, kion fari? Ĉu resti aŭ iri al Elinjo.



–Onklino kara, kie vi estas? – li vokis la maljunulinon. – Ne faru ĉi tion al mi! Ne kaŝu vin de antaŭ mi!

Li atendis kelkajn minutojn, sed li ne ricevis respondon.

–Mi estas Johano. Elinjo kara, venu ĉi tien! – li kriegis nerveze.

–Mi ne povas. Miaj piedoj estas katenitaj. Krome inter ni estas nevidebla muro. Unue vi devos ruinigi ĝin. Rapidu, ĉar mi ne havas multe da tempo.

Nun jam Johano tute konfuziĝis. Ĝi estis tro multa por li. Li neniam pensis, tiom multe da aventuroj trafos lin dun ferio. Antaŭ la akiro li opiniis, la ekskurso al Luno estos agrabla. Li pasigos kelkajn belegajn tagojn ĉe sia onklino kaj poste li flugos hejmen kun belaj memoroj.

Nun li estas en fora planedo, kiel ekzelito kaj lia vivo estas en danĝero. Eble li mortos baldaŭe aŭ li tute frenezigos.

Li devas liberigi Elinjon, tiun admirandan junulinon. Ŝi atendas lian nepran helpon. Almenaŭ li scius, kie estas la onklino.

–Mi iras, kara – li kriegis al Elinjo.

Estu kie ajn la onklino, nun Johanon pli bone interesis la junulino.

Li ankoraŭfoje ĉirkaŭrigardis kaj li vokis kelkfoje

la onklinon Izabela.

–Onklino Izabela! Onklino Izabela, kie vi estas? Kio okazis al vi?

Li ne ricevis respondon. Surda silento estis. Li aŭdis nur la mallaŭtan helpkrion de Elinjo.

Johano ekiris al la direkto de la voĉo. Li timis, sed la timon venkis la amo, kion li sentis en sia koro.



Komence li iris sen malhelpo kaj al li ŝajnis facila atingi la virinon. Li tute forgesis la nevidebla muron. Eble ĝi ne ekzistas. Tie estas nenia nevidebla muro. Elinjo scias malĝuste.

Fine li jam preskaŭ kuregis. Lin interesis nenio. La unusola celo estis plej rapide atingi lian karulinon.

Neatendite lia kapo puŝiĝis al io. Johano ne povis iri plu. Vane li provis preterpasi la barilon aŭ tiun nevideblan objekton, kiu haltigis lin, ĉie ĝi estis netrairebla.

Kiel frenezulo li frigrumis ĝin aŭ li provis piedbatadi, la barilo ne permesis lin iri plu.

Aliflanke li aŭdis la ĝemajn helpkriojn de Elinjo.

–Johano kara, help' min! Help'!

La lastaj vortoj jam estis tre malfortaj, apenaŭ aŭdeblaj.

Nepre li devas trovi ian trairejon. Neeble, kel i ne povas helpi al ŝi.

Dum la cerbumado subite li ekaŭdis la voĉon de la onklino Izabela:

–Johaĉjo, kial vi foriris? Ne lasu min sola! Bonvolu reveni!

„Mi frenezigiĝis.” – pensis Johano kaj sidiĝaĉis apud la nevideblan muron.

-daŭrigota-



Por infanoj

La koko de mia avino



Mia avino havis belegan, sed tre bataleman kokon. Kiel malgranda knabeto ne estis saĝa penso iri sola al la birdokorto. La batalema koko tuj atakis kaj kurigis min. Se hazarde mi ne sukcesis rifuĝi, tiam ĝia Moŝto pikadis miajn krurojn, eĉ ĝi volis flugi sur mian kapon.

Dank' al Dio, ĉiufoje mia amata avino savis min kaj la batalema koko estis batdifektita per longa stangeto. Ofte ĝi rompiĝis sur la dorso de la malfeliĉa besto.

Malgraŭ tio ĉiu ŝatis ĝin en la domo. Ĝi estis vera sinjoro en la birdokorto.

Ĝi bonege defendis siajn subulojn kaj ĝi zorgis pri ili.

Okazis en iu fruaŭtuna vespero, kiam jam je la sepa horo estis malhelto kaj oni prefere estis en la domo, ol ekstere, vulpo vizitis la birdokorton de mia avino.

Ĉiu scias la vulpo estas ruza besto. Ĝi bone scias, kie ne estas hundo. Tien ĝi malkuraĝis eniri, eĉ ĝi evitis malproksime tiun danĝeran teritorion. Kiu vulpo ne ellernas ĝin, tiun la timigaj hundoj kaptas kaj la vulpo povas adiaŭi de sia vivo. La vulpopatrinaj bonege instruas al siaj idoj, kiun domon ili evitu.

Mia avino ne havis hundon. Tial ŝia birdokorto estis inda loko por akiri kokinaĵon.



La ruza besto singardeme aliris la domon. Ĉe la barilo ĝi atendis iomete por konvinkiĝi, ĉu estas hundo aŭ ne.

Kiam ŝajnis ĉi tie ne estas danĝerulo ĝi kaŝiris al la

kokinejo. Ĝi majstre sciis, kiel devas eniri, malfermi la pordon. Ne unuafoje ĝi faris ĉi tion.

Komence ĉio glate iris. La vulpo antaŭĝojis, ke ĉi vespere estos reĝa vespermanĝo. Jam delonge ĝi apenaŭ manĝis ion. Ĝia stomako tre murmuris atentigante ĝin pri la malsato.



Bedaŭrinde ĝi forgesiĝis pri la koko de mia avino. En aliaj birdokortoj la kokoj ĉiuj estis timemaj kaj plejofte ankaŭ ili fariĝis la ĉasaĵoj de la vulpo.

Sed nun la vulpon atendis bravulo. Ĝi ne ektimis, eĉ ĝi heroe defendis siajn subulojn. Tuj el cent vundoj sangis la vulpo kaj ĝi faris grandan bruon vekante la domanojn.

Miaj geavoj elsaltegis el la lito kaj kuregis eksteren el la ĉambro.

–Kio okazis? – demandis mia avino scivole. – La koko nia kriaĉas, kvazaŭ io estus en la kokinejo. Eble vulpo aŭ alia bestaĉo. Hieraŭ la najbarino diris, ke vulpo vizitis ilin. Iru, avo por rigardi kio okazis tie!

Mia avo kuris al la kokinejo. Li surpriziĝis pleje, kiam li ekvidis en la lumo de la pošlampo la batalanta kokon kontraŭ la vulpo.

La ruza besto apenaŭ povis saviĝi de la bategoj de mia avo. Li batis ĝin plurfoje per sia pantoflo.

En la lasta momento ĝi sukcesis elsalti el la kokinejo. Ĝi fulmrapide forkuregis kaj neniam revenis. Eble ĝi timis pli bone de la koko de mia avino, ol la vilaĝaj hundoj.

Ekde ĉi tiu vespero miaj geavoj tre respektis la kokon. Ili pardonis al ĝi ĉion. La koko ne devis timi, ke en iu bela dimanĉa tago el ĝi oni faros festan tagmanĝon.

Ĝi mortis maljune. Ni ĉiuj priploris pro ĝia foriro al la ĉielo de la gekokoj. Certe ankaŭ tie ĝi estas la reĝo kaj ĝi defendas siajn subulojn.

-Onklo Adalberto-



Humoro

En restoracio

–Kelnero, ĉi manĝaĵo estas nemanĝebla. Terure! Tuj portu al mi la plendolibron, mi deziras noti en ĝi mian neplaĉon.

–Kioman volumon vi deziras, sinjoro?

*



*

Peĉjo iras al la najbaro

–Salut’! Nia paĉjo deziras prunti vian magnetofonon

– li diras.

–Kial, ĉu vi deziras danci?

–Ne. Ni volas dormi.

*

Ĉarma polipo



*

–Mia patro estas aŭtoriparisto. Kion faras la via?

–Tion, kion mia panjo diras al li.

*

Humoro

–Paĉjo, kiam oni fariĝas ebria?

–Ekzemple tiam, se ĉe tiu arbo oni vidas kvar virojn anstataŭ du.

–Sed paĉjo, tie staras nur unu viro.

*



*

Avarulo

Post la tagmanĝo la avarulo demandas la kelneron.

–Ĉu vi trinkas alkoholon?

–Neniam.

–Tiam mi ne donas al vi trinkmonon.

*



*

–Kiam veturas la bopatrino per biciklo?

–Kiam ŝia balailo estas ĉe riparisto.

*